# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo** **oktobro 2020**


## SUKCESO DE LA SABATA RENDEVUO, SED NI REVENAS AL RETO

Kiel anoncite, la 12an de septembro ni reprenis niajn kutimajn sabatajn rendevuojn ekster la sidejo, kaj grupo de esperantistoj kunvenis en la parko Retiro apud la statuo de Ricardo Codorniu. La grupo ne estis tre ampleksa, sed venis kelkaj novuloj, kiuj unuafoje parolis la lingvon, kaj ni pasigis agrablan kaj sekuran vesperon.



Nia intenco estis renovigi la rendevuon en tiu ĉi oktobro, sed la novaj sancirkonstancoj kaj la aprobitaj malpermesoj igas nin transigi ĝin al la reto. Do, MEL decidis kunvoki madridajn esperantistojn (kun invito al ĉiu ajn interesito ekster la regiono) al interparolado pere de la reto. Ĝi okazos la 3an de oktobro, sabate, de la 6a ĝis la 8a vespere. Ni utiligos la servon Jitsi, kaj ni jam rezervis kodon por ĝi: "**MadridaSabataRenkonto**". Do enŝaltu la programon Jitsi en via komputil- aŭ telefon-sistemo kaj tajpu tiun kodon, aŭ simple malfermu navigilon kaj klaku en: https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto.

Informo kaj ligilo aperas ankaŭ en: https://eventaservo.org/e/OktobroEnMadrido.

Dum la monato oktobro ni esperas ke la sidejo plu malfermiĝos dum la lundaj vesperoj, kaze ke vi deziras fari iun ajn demarŝon aŭ rendevui kun la tie deĵorantaj respondeculoj, sed denove ni petas ke vi anoncu vin kaj vi prenu la normalajn antaŭzorgojn.

Ni ankaŭ ne povas informi nun pri kursoj kaj aliaj ĉeestaj aktivaĵoj, por kiuj ni atendas la evoluon de la pandemio kaj la konsilojn de la aŭtoritatoj.

## TAGO DE LA VERKISTINOJ

La 19an de oktobro la Nacia Biblioteko de Hispanio (BNE) okazigas la kvinan eldonon de la Tago de la Verkistinoj. Pere de publika alvoko, Biblioteko Juan Régulo Pérez de HEF estis invitita al partopreno.




La titolo de nia agado estos "Sus voces en esperanto" (Iliaj voĉoj en Esperanto), kaj ĝi okazos virtuale, per la prezentado per video de diversaj tekstoj de hispanaj aŭtorinoj tradukitaj al la internacia lingvo. Ankaŭ aperos traduko al Esperanto de la enkonduka prezentado de la agado, kies aŭtoro estas Elvira Lindo.

Pliajn detalojn vi povas legi ĉe: https://diadelasescritoras.bne.es/.


madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

Ankaŭ en novembro ni partoprenos alian kulturan aktivadon en Madrido. Temas pri la "Nokto de la Libroj". Ĝi estis antaŭvidita por la monato aprilo, en la tagoj ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Libro, sed devis esti nuligita pro la pandemio. Nun oni denove kunvokis ĝin kaj ni partoprenos per virtuala prezentado la 13an de novembro. En venonta Nia Voĉo ni informos pri la konkretaj detaloj, sed vi povas rezervi jam la daton.

## DENOVE KURSOJ EN LA UNIVERSITATO UNED, NUN ANKAŬ ĈE NIVELO B1

En tiu ĉi akademia kurso 2020-2021 denove okazos kurso de Esperanto en la Centro pri Lingvoinstruado CUID de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio UNED, kaj ni havos novaĵon: al la jam du jarojn disvolvita nivelo A2 aldoniĝos alia kurso je nivelo B1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por Instruado de Linvoj (KER). Memoru ke la nivelo A2 estas la baza por Esperanto (ne ekzistas A1, ĉar tiu estus tro baza). La nivelon B1 vi povas aliri se vi jam sukcesis la A2 kaj ankaŭ se vi konsideras ke via nuna lingvokono estas sufiĉa por transiri rekte al tiu kurso.




La periodo de enskribiĝo komenciĝis en septembro kaj daŭros ĝis la 22a de oktobro.

La kursoj de Esperanto disvolviĝas kun la apogo de Hispana Esperanto-Federacio, pere de kunlabora inter-konsento kun la Universitato. HEF zorgas pri la pretigado de kriterioj, ellaborado de materialo kaj selektado de la instruistoj, sed pri la organizado zorgas la CUID, en kies retejo oni povas legi la detalojn kaj povas formaligi la enskribiĝon. Jen la adreso: https://app.uned.es/portal/admision-matricula-por-internet. Pliaj detalojn eblas legi ĉe: http://www.cuid.uned.es/.

## ĜENERALA KUNVENO DE HEF

La 18an de oktobro estas kunvokita la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. La ĉefa bazo estos la sidejo en Madrido, sed ni planas ke la plejmulto de la partoprenontoj ĉeestos per la reto. Se vi estas ano, vi povas kontakti kun la Skajpa konto de HEF, @esperantoes. La kunveno estos grava, ĉar oni tie laŭstatute renovigos la estraron de la asocio.

Ankaŭ okazos ĉimonate ĝenerala kunveno de SAT-en-Hispanio, la 11an de oktobro. Kontaktu kun la asocio por koni la detalojn.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/. Por la reta renkonto, vidu: https://eventaservo.org/e/OktobroEnMadrido.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com